

ELNA NEWSLETTER

**NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM
AND ESPERANTO AS A SOLUTION**

July-August 1982



DR. WILLIAM SOLZBACHER (far left), Emeritus Voice of America expert, escorts U. S. Consul General for Belgium **Thomas H. Gewecke** (second from left) at the formal opening of the 67th World Esperanto Convention, Antwerp, Belgium, July 25. Mr. Gewecke addressed the Convention in Esperanto. (text inside) [foto by TK]

INSIDE:

Summer Events
Virinaj Aferoj
Esperanto in Parliament
SFSU Pictures
Local Club News

THOMAS H. GEWECKE, U. S. Consul General in Antwerp, Belgium delivered the following address in Esperanto at the 67th World Esperanto Convention, July 25, 1982:

“Sinjoro Prezidanto, estimataj reprezentantoj, gesinjoroj: Mi dankas vin pro la okazo diri kelkajn vortojn hodiaŭ ĉar mi ŝuldas ion al Esperanto.

“Estis antaŭ dudek-kvin jaroj, kiam mi estis knabo en Chicago, ke mi lernis Esperanton por korespondi kun homoj en aliaj landoj. Tio estis la komenco de intereso en fremdaj lingvoj kaj internaciaj rilatoj kiu min kondukis al kariero en diplomatio.

“...Mi deziras esprimi mian subtenon de la penoj de la Universala Esperanto-Asocio por kreskigi la komprenon inter la popoloj de la mondo, certe unu el la plej gravaj taskoj de nia epoko.

“En nomo de la ambasadoro de Usono en Belgio kaj de la konsulejo en Antverpeno, mi salutas vin kaj deziras al vi plej sukcesan kongreson.”

VIRINAJ AFEROJ

RAPORTO DE KUNSIDO DE ELNA KOMITATO POR VIRINAJ AFEROJ - St. Petersburg, julio. Prezidis Ellie Stein, Vicprezidanto kaj Komitatestro pri Virinaj Aferoj-ELNA.

Sendube estis la kordeziroj de la virinoj kiuj kunvenis en St. Petersburg, Florido, 16-20an de julio dum la Kongreso de la Esperanto-Ligo por Nordameriko, ke en la mondo okazu paco, virina egaleco, kaj pliboniĝo en vivrimedoj por virinoj.

Betty Manson, UN-UEA Delegito al la Laborgrupo por uzado de Esperanto en UN, prezentis UN-progresraporton pri la Jardeko de Virinoj. “Ankoraŭ ekzistas,” ŝi diris, “malegaleco en laboro kaj salajroj.”

S-ino Manson raportis pri la UN-Instituto por Internacia Esplorado kaj Edukado por la Progreso de Virinoj (t.n. United Nations International Research and Training Institute for the Advancement of Women - INSTRAW). Estas ties celo helpi pere de esplorado, edukado, kaj interŝanĝo de informo al la progreso de virinoj, ekonomie, socie, kulture, kaj politike. Tiuj celoj estas priskribitaj en la Deklaro de Meksiko Pri la Egaleco de Virinoj kaj iliaj kontribuoj al mondevoluo kaj paco konforme al decido de la Mondkonferenco de la Internacia Virina Jaro. Manson raportis ke la “Jardeko de Virinoj” daŭros ĝis la fino de 1985.

Pri Usonaj virinoj la kunsidantoj pritraktis la temon: “Kiel allogi junulinojn al la Esperanto-Movado en Usono? Raportis Cathy Schulze, UEA Komisiito por Virinaj Aferoj, ke stranga fenomeno en Usono estas ke junuloj – sed malofte junulinoj – studas Esperanton. Tiu situacio ne estas tiel rimarkinda en aliaj landoj kie gejunuloj ludas egalajn rolojn en la aferoj de la Tutmonda Esperantista Junularo-Organizo (TEJO).

Rezolucio de Betty Manson, ke ELNA-membroj penu stimuli intereson pri Esperanto inter Usonaj skoltinoj, akceptiĝis.

Sekvis mallonga diskuto pri la demando, “Kiel la voĉoj de virinoj estu aŭdataj en la mondo?” Komunikado vere estas grava afero inter virinoj en la Esperanto-movado. Oni atentigis, ke *Sekso kaj Egaleco*, redaktita de Anna Brennan en Italio tre valoras. (Havebla de ELNA Libro-servo, proks. \$6.00.)

Ellie Stein anoncis ke S-ino Yamakawa, Japanio, kontribuanto al *Sekso kaj Egaleco* volas instigi aktivulojn en la virina movado, lerni Esperanton pere de korespondkurso cele al verkado de artikoloj por *Sekso kaj Egaleco* kaj interŝanĝo de vidpunktoj, ktp.

Mary Drake petis ke ĉiu virino konscie agu por paco.

S-ino Schulze prezentis rezolucion al la ELNA-Komitato konstatintan ke en la dektri jaroj de la Esperanto-kursoj ĉe San Francisco State University, nur du junulinoj petis student-subvenciojn (el entute 30 subvencioj). Por instigi pli da junulinoj serioze studi la internacian lingvon, ELNA akceptis la rezolucion ke ĝiaj membroj speciale atentigu junulinojn pri la havebleco de subvencioj por daŭrigaj kursoj ĉe San Francisco State University.

– raportis Ellie Stein

KIA LA MODERNA VIRINO?

Certe neniel apostolo de feminismo, La Apostolo Paŭlo, en sia Letero al la Efesanoj, atentigis jene: “Edzinoj, submetiĝu al viaj edzoj...ĉar edzo estas la kapo de la edzino...”

Nenio rimarkinde ŝanĝiĝis en multaj viraj cerboj ĝis la lasta parto de la nuna jarcento. En 1900 gazeto en Parizo demandis elitulojn, kiel ili imagas la virinon de la 21a jarcento.

Leoncavallo, la fama komponisto, respondis: “Ho, kiel artisto kaj poeto mi eksents frostotremojn, se mi pensas pri virinaj advokatoj, virinaj kuracistoj, kaj virinaj bankistoj. La virino estas amo, idealismo, kaj memofero. Ŝi restu tia. Tiamaniere ŝi daŭros regi la mondon.”

George Ohnet, fama romanverkisto: [Pro kio sekvas, li ne ripozu en la tombo! – Redaktoro]

“de kiam ekzistas la mondo, nenio ŝanĝiĝis ĉe la virino, krom ŝiaj vestaĵoj. Jam en la tempo de kreado Eva montris sin tia, kia ŝi estas hodiaŭ. Tiam ŝi havis jar nur unusolan vestaĵon: sian hararon. Hodiaŭ ŝi surportas ĵupon, puŝmanikojn kaj riĉe falditan kolumon, ŝajnas, ke ŝi tre ŝanĝiĝis. Sed ŝi restas, kia ŝi estis.”

Pli homece la komentoj de **Georg Brandes**, la filozofo:

“Mi pli volonte volas paroli pri deziroj, ol pri supozoj. Mi opinias, la justeco postulas, ke la laboro de la virino devas esti pli bone pagata. Ankaŭ en la sentovivo de la virino, ŝanĝo necesas. La duono de la virinaj sentoj estas foruzitaj de la ĵaluzo kaj tamen ne ekzistas pli aĉa sento ol ĉi tiu. La fariseaj juĝoj pri needziniĝintaj virinoj, kiuj havas nelegajn infanojn, devas ĉesi...”

Sed **Marcel Prevost**, aŭtoro de sukcesaj romanoj, speguligis pli klare la hodiaŭan virinon:

“La inteligenteco de la virino de la 20a jarcento kreskos kaj fortiĝos kaj per tio ankaŭ ŝia sento por sendependeco. Ŝi havos malpli da pasieco, sed ankaŭ malpli da hontemo. Ŝi okupiĝos pri siaj personaj intereso, estos egoista, sed sobre egoista, kio ne malhelpos daŭran simpatian al iu viro. Ŝi havos malpli da ĉarmo, malpli da sorĉo, sed pli da certeco. Malpli da delikateco, pli da prudento.”

Se gazeto en jaro 2000 same enketus pri virinoj en la 21a jarcento, kiel respondos la viroj?

[citaĵoj el *Norda Prismo*, 1-1955]

EL POPOLA ĈINIO 3-1982 enhavas plurajn artikolojn pri **Virinoj en Ĉinio**.

ESPERANTO IN THE NEWS

SSAM (Soldiers, Sailors, and Marines) MAGAZINE, published by the U.S. Department of Defense, in its July issue carried an article on Esperanto resulting in inquiries to the ELNA Central Office from all branches of the service.

ROSICRUCIAN DIGEST, June, carried the article "Esperanto—The Language of Man" by Chris R. Warnken, F.R.C., Grand Master Emeritus, in which he makes a strong case for the international language. Mr. Warnken, in his world travels for the Rosicrucian Order, has often come up against the language barrier. Seeing clearly the need for a common, relatively easy language led him to the study of Esperanto.

FAMILY WEEKLY, a magazine section appearing in newspapers across the country, on July 25 carried an item "Undoing the Tower of Babel." Breughel's painting, "Tower of Babel" illustrated the feature and appears on a new postage stamp issued by Belgium this summer to coincide with the World Esperanto Convention in Antwerp.

Eliot Kaplan, the writer, featured the item in the column *What in the World?* which he edits. He concluded the column with the farewell given by conventioners in Antwerp looking toward the 68th Esperanto conclave in Budapest next summer: "Mi vidos vin en Budapeŝt venontjare" ("I'll see you in Budapest next year").

This well-written column produced numerous thoughtful inquiries about Esperanto at the Central Office.

YALE ALUMNI MAGAZINE AND JOURNAL, March 1982, under the heading "Planned Language vs Ethnic" carried a letter by Dr. Pierre L. Ullman, Professor of Spanish, University of Wisconsin-Milwaukee. Prof. Ullman strongly recommends that children begin their foreign language studies with Esperanto.

WESTERN EUROPEAN SPECIALISTS SECTION NEWSLETTER, Santa Cruz CA, June, pages 7-18 carried a listing "**Publishing In and On Esperanto, and Esperanto Holdings in American Research Libraries**" (©American Library Assn., 1982). The list was compiled by Dr. Richard E. Wood, Department of English and Foreign Languages, Southeast Missouri State University.

THE PLAIN TRUTH, May, under the heading "A Universal Language" carried a letter by Czeslaw Witkowski of Ft. Lauderdale, Florida.

VEGETARIAN TIMES, April 1982, featured an article "Esperanto for Vegetarians" by Scott Smith in which he discusses the role of Esperanto in the work of various specialist groups, among them the World Association of Vegetarian Esperantists.

ESPERPENSA, July 1982. This bulletin of the organization of Esperanto-speaking members of MENSA highlights a discussion by Francois Lo Jacomo, France, on his doctoral dissertation "Liberty or Authority in the Evolution of Esperanto." Lo Jacomo concludes: "...My essential goal was to stimulate more profound study of these subjects which are not sufficiently treated at the university level."

THE OREGONIAN, June 15, 1982 carried an interview by staffer Paul Pintarich of Jim Deer on the unique features of Esperanto which make it a worthy candidate for the role of international language.

SAN FRANCISCO EXAMINER, Travel Section, June 13, 1982 carried a letter from Cathy Schulze, pointing out the advantages of travel using the international language, concluding: "With Esperanto, no one is the 'foreigner.' It is incomprehensible to me why people perversely continue to tolerate the language barrier."

SAN FRANCISCO EXAMINER, July 5, 1982 carried an item from Knight News Service about Jos. Lejderman of Toronto, Canada who, having learned Esperanto, will not find himself all dressed up with no place to go when the World Esperanto Convention comes to Vancouver in 1984.

THE PRESS COURIER, Ventura County, California, June 11, 1982 carried a lengthy article by Linda Williams entitled "Esperanto Opens Doors to World Communication" with photos of Scott Smith, Dean and Jo Renshaw, and Elwin Reed.

THE MORNING NEWS, Wilmington, Delaware on June 28, 1982 featured an interview with ELNA's Secretary, Benn Clouser.

THE ELMHURST (Illinois) PRESS, March 5, 1982 carried Karen Hadder's article "Universal Language Inspires Instant Friendship" quoting long-time ELNA member Robert Runser, a former airline pilot, about Esperanto in his world travels.

THE BOSTON GLOBE, July 4, 1982 carried "For Travelers, Esperanto Could Be a Blessing", an excellent interview with Ralph Murphy by staffer William A. Davis. This article was picked up by the wire services and so far has appeared in the *San Jose (CA) Mercury*, resulting in hundreds of inquiries to ELNA's Central Office about Esperanto.

THE MILFORD (Massachusetts) REPUBLICAN featured an article by Sally Harrington: "Esperanto is a Modern Cultural Language" plus a letter by Florence Mack of Framingham, MA.

THE TIMES (Oregon) featured Jim Deer in an interview by Susan Claybourn Craig, "Pardon My Esperanto."

DALLAS MORNING NEWS, August 4, 1982 carried an article "Such Uncommon Language" by Stephen Bloom, inspired by Michael Jones, a computer programmer and ELNA member. The article, complete with a handsome color photo of local club members, occupied most of two pages.


ESPERANTO & PARLIAMENT

The Esperanto Parliamentary Group in Britain was founded in 1973 with ten members. Now, with 146 members from all political parties, it is the largest lobby in the whole parliament. An attractive brochure listing these members was provided everyone attending the 67th World Esperanto Convention at Antwerp, Belgium.

During the Convention, July 27 was designated "European Day." Members of the European Parliament, together with officials of the European Community and other European Organizations, were invited to visit the convention. Thus, they experienced personally an international assembly without translators, without headphones, and without language barriers.

NOTE: Members of parliaments in any country may join the group without subscription, and will be regularly informed about the progress of Esperanto. Apply to: Inter-Parliamentary Esperanto Group, 140 Holland Park Avenue, London, England W11 4UF.

SAN FRANCISCO STATE




-1-



-4-



-2-



-5-




-3-



-6-

1. The Instructors: Dr. James Cool, Charles Power
2. Buffet at the Harmons' gathers (l-r) locals Bill Schulze, Dan Burke, Lucy Harmon, and Mira Sulimierska (Toronto), Charles Nelson (San Diego)
3. Standing: Ernest Brown (Iowa); Frederick Schoener (Pueblo); John Mathews (Sacramento); Joan Feingold (NY). Sitting: Indrani Beharry-Lall (Vancouver); Betty McLean (New Westminster BC); Jean Fremont (Vancouver); Cleo Fort (Sun City AZ)


4. Akimichi Takemura (Tokyo); Indrani Beharry-Lall (Vancouver); Michael Grego (Ukiah CA); Tomoko Yoshinaga (Japan); Jon Cortes (Santa Cruz CA); Hoshiko Miyamoto (Tokyo); S-ino Takemura (Tokyo)
5. Indrani Beharry-Lall plays role in "La Psikiatro"
6. Mingchi Chian (Shanghai) plays the flower vendor; Jane Sloan (Sidney BC) and Peter Royce as clients in "La Vazo."



-7-



-10-



-8-



-11-



-9-



-12-

7. Derek Roff (Albuquerque NM); Marie Zacherl (Vancouver), head of local committee for the 1984 World Esperanto Convention to be held in Vancouver
8. Walter Gnagy (Kauai, Hawaii); Bill Harmon, past president of ELNA; James Campbell (Wyandotte MI); Fred Schoener (Pueblo CO)
9. Jean Fremont (Vancouver); Nan Karel (Kirksville MO); Joan Feingold (NY)

10. Dr. Edwin Feldman (San Carlos CA) and Minerva Rees (Daly City CA) relax at the Schulze garden party.
11. Hope Smith (Santa Barbara CA); Virginia Givens (Berkeley CA)
12. Mike and Judy Fernandez and children, home from a teaching assignment in Germany.

LOCAL CLUBS



FLORENCE CURTIS – 100 YEARS YOUNG!

[Photo by Dickerman]

Naskiĝita ĉe farmbieno en Ŝtato Illinois en junio, 1882, Florence Curtis venis kun sia familio al Kalifornio kie ŝia parto serĉis oron. Belulino de la minkampejo, ŝi fariĝis instruistino kaj poste edziniĝis al min-inĝeniero. En ilia domo troviĝis la sola bankuvo en la vilaĝeto.

Poste, vidviniĝinte, ŝia vivo estis malfacila sed sole ŝi sukcese kreskigis 3 gefilojn. En la 75a jaro, S-ino Curtis komencis lerni Esperanton kaj dum la pasintaj 25 jaroj ŝi aktive partoprenis plurajn Esperanto-konferencojn kaj fidele kontribuis finance.

Nun, kvankam blinda kaj en delikata sanstato, ŝi ankoraŭ ĉeestas la simfonion kun sia nepo. Ŝia aktiva menso sekvas ĉion Esperantistan. Longe vivu nia kara Florence! Salutojn sendu al: Florence Curtis, Arden Memorial Convalescent Hospital, 3408 Alta Arden Expressway, Sacramento CA 95825.

SANTA BARBARA

Crane School Fifth Grade pupils of Ms Janus Hudson were fascinated by the origami demonstration of Senjo Umeda of Tokyo. Dorothy Holland translated Senjo's Esperanto into English, but the youngsters, who have been studying Esperanto with Mr. Eikenberry, were delighted at how much they understood without translation.

FLORIDA

Tampa: American Red Cross Language Bank services of the Greater Tampa Chapter lists Esperanto as one of the 43 languages at its disposal. Gizella Giguere is their Esperanto-speaking contact.

NEW MEXICO

Gallup: 100 Navajo youth hear about Esperanto. During a conference on the Navajo Reservation in Gallup in June, Roan Orloff Stone spoke to a group of young people who wanted to know about the international language.

NEW YORK

Weis Ecology Center, Ringwood NJ, was the locale for a weekend providing four sessions of Esperanto instruction at basic, intermediate, and advanced levels. Twenty-six people enjoyed the instruction of Prof. Leonard Dzelzitis, Dr. Alexander Kharkovsky, and Dr. William F. Orr of Hofstra University.

WASHINGTON

Seattle: Martha Evans of Sidney, BC was featured at the August program of the Seattle Esperanto Society. Members enjoyed a preview of her new Esperanto song book during a Sing-Along-With-Martha session.

MANAGUA, NICARAGUA

ELNA member Julie Regal reports continued enthusiasm and progress by the many students in her Esperanto classes. Esperantists visiting Managua will be welcomed. Write: Julie Regal, Aptdo. 1889, Managua, Nicaragua.

ANONCOJ

AFIŜA KONKURSO

Konkurso por simbolo por la Esperanto-Jubilea Jaro. Premioto ricevos 1000 Ned. Guldenojn (proks. \$390 U.S.). Desegnaĵoj ricevendos antaŭ novembro 1a, 1982. Detalojn petu de UEA pri la celoj de la afiŝo.

MAGIA LANTUKO trikata de ELNA membro Cecelia Peterson (Downey, CA) kaj donacita de ŝi al ELNA por loterio gajnis \$226 por la ELNA kaso. La belega orkolora lantuko estis gajnita de Ellie Stein, vicprezidanto de ELNA, kies bileto estis eltirita ĉe la ELNA-kongreso en St. Petersburg. Elkoran dankon al nia fidela membro, Cecelia Peterson!

DISERTACION pri "Esperantaj bibliotekoj en la mondo" preparas F-ino Eleonora Worsztynowicz, ul. Poznanska 26, m.37, PL 63-100 ŚREM, Pollando. De Esperantistaj bibliotekistoj ŝi esperas ricevi inforilojn pri Esperantaj bibliotekoj.

POŝTMARK-KOLEKTANTOJ atentu! La aprila numero de *Bulletin of Post Mark Collectors Club* enhavas artikolon far Conrad Fisher pri la Esperantaj poŝtaj stampoj (angle, "cancellations") de la mondo. Informoj en la artikolo inkludas: ĝis marto 1982, 827 Esperanto-stampoj uziĝis far 30 nacioj kaj la iam Libera Urbo Dancigo, laŭ la *Katalogo Pri Poŝtaj Esperanto-stampoj* kaj ĝiaj suplementoj de 1979 kaj 1980. La unua tia stampo uziĝis en 1912 ĉe la kongreso en Krakovo, tiam Aŭstrio. Pollando uzis 122 stampojn ĝis 1982. La adreso de la klubo estas: 4404 NW 43rd Terr., Tamarac FL 33319.

GRAVA OPORTUNO POR DEDIĈITA ESPERANTISTO

La posteno de Direktoro, ELNA Centra Oficejo, estos vaka frue en 1983, pro la "emeritiĝo" de nia tre ŝatata aktuala direktoro, Don Harlow.

Plenumi tiun postenon estas neniel ferio; ĝi postulas fervoran laboradon kaj estas ŝarĝoplena okupo por modesta salajro. Tamen la direktoro estas en la konstanta centro de Esperantaj aferoj, kaj estas ĉefrolulo en la batalo por rekono en Usono.

La posteno postulas loĝadon en la San Francisco-regiono; posedo de aŭtomobilo prefera sed ne nepre. La direktoro devas scipovi Esperanton bonege kaj flue, bone koni la literaturon, kaj havi almenaŭ bazan scion de librotenado. Kandidatoj pretaj sin dediĉi al la laboro por minimume 2 jaroj estos preferitaj.

Interesatoj skribu (Esperante!), kun personaj detaloj kaj listigo de spertoj/kapabloj, al: William R. Harmon, ELNA Komisiito por Centra Oficejo, 1016 King Drive, El Cerrito CA 94530. Ĉiuj komunikaĵoj estos konfidencaj.

Enclosed is \$_____ for new renewal membership in ELNA for the year 1983
 Enclosed is \$_____ as my tax-deductible donation to ELNA.

NAME _____ Name and address of each new member published
 in ELNA Newsletter and next edition of the
 ADDRESS _____ ELNA Adresaro unless member indicates otherwise.
 CITY, STATE, ZIP _____

Check correct category: Regular (\$25) Family (\$37.50) Youth (18 or under) (\$12.50)
Student (full-time, 25 or under) (\$12.50) Senior (65 or over) (\$15.00) Sustaining (\$50) Life (\$500)

DATE OF BIRTH (If applying for Youth, Student, or Senior Membership)_____

Telephone Number: Area Code []_____ Radio Call Sign _____
 May we publish your telephone number in the ELNA Adresaro? _____ May we publish your address?_____

ELNA SERVICES

Office Hours - ELNA CENTRAL OFFICE - [415] 653-0998 Monday - Friday 9:30 - 4:30

CORRESPONDENCE COURSES - Basic and Advanced -
 Write ELNA Central Office for registration forms.

EXAMINATION SERVICES

Send self-addressed stamped envelope for syllabus and application form for the Basic, Intermediate, or Advanced Examination to: Usona Ekzamena Servo, 1010 Crestwood Pl., Santa Barbara CA 93105.

ELNA TAPE LIBRARY

Send self-addressed stamped envelope for list of available tapes to: H. K. VerPloeg, 321 E. 19th Ave., Spokane WA 99213

ELNA BOOK SERVICE - Magazine Subscriptions, bulk informational materials, classroom texts, etc. Order from ELNA Central Office.

SAN FRANCISCO STATE UNIVERSITY YOUTH SCHOLARSHIP Fund for advanced Esperanto study. Contact Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough CA 94010 for information.

VIRINAJ AFEROJ: Kontakto Cathy Schulze aŭ Ellie Stein.

OFICISTOJ DE ELNA:

Prezidanto: Thomas A. Goldman
Vicprezidanto: Ellie Stein
Kasisto: John B. Massey
Sekretario: Benn E. Clouser
Estraranoj: James Cool, Ellen Eddy, Joan Gildemeister, Thomas Goodman, William R. Harmon, Julius Manson, David Richardson, William Schulze, Douglas Swett.

KOMITATOJ KAJ KOMISIITOJ DE ELNA:

Komisiito por Centra Oficejo: William R. Harmon
Direktoro de la Centra Oficejo: Donald Harlow
Komisiito por Informado: Ralph Murphy
Komisiito por Junularaj Aferoj: James Cool
Komisiito por Olimpikoj 1984: Bernice Garrett
Komisiito por Sonbenda Servo: H. K. VerPloeg
Komisiito por Testamentaj Aferoj: John Massey
Komisiito por Virinaj Aferoj: Ellie Stein
Komisiito por Vojaĝaferoj: Lucille C. Harmon
Komitato pri Scienco kaj Tekniko: Estro Kent Jones
Komitato pri UN-Aferoj: Julius Manson
 Mark Starr
Redaktoro de ELNA NEWSLETTER: Catherine Schulze

NEKROLOGO

RALPH GREENWOOD mortis pro kancero je 12a de julio. Ralph estis aktiva membro de Esperanto Asocio de Los Angeles kaj de ELNA. Niajn kondolencojn al vidvino Ruth Greenwood.

W. CAMPBELL NELSON mortis je 30a de junio. S-ro Nelson estis distingita membro de la ELNA Estraro, diplomito de MIT kaj Cal Tech. Li servis en multaj komunumaj aferoj i.a. University Club, Claremont; prezidinto de Ontario Host Lions Club; prezidinto de Pomona Valley Community Concert Association; valora membro de EALA, ELNA, kaj UEA. Elkorajn kondolencojn al vidvino Gladys kaj familianoj.

—Travel Notes from Lucy—

SIGN UP FOR UK IN BUDAPEST NOW...

After the UK in Antwerp I visited Budapest, talked with the LKK there, and visited the site of the 1983 UK. We are expecting the 1983 UK to be one of the biggest and best of all. The local committee is preparing for 3000 or more participants, and there are certainly enough Esperantists in Budapest and on the committee to do it well.

Budapest is a beautiful city, Hungary is truly "Esperantujo", and the costs will pleasantly surprise you. Your Esperanto Travel Service is reserving 40 hotel spaces in the hotel which is part of the Kongresejo, and air space for 40 passengers to the UK from the U.S. We are arranging for early arrival to allow for jet lag, a five-day post-congress tour through Hungary, and a 4-5 hour Hydrofoil cruise up the Danube for a two-night visit in marvelous Vienna before returning home.

We will need to know early on whether we have enough space. If you are seriously interested, contact me as soon as possible for details.

Lucille C. Harmon – Esperanto Travel Service
 578 Grand Avenue, Oakland CA 94610
 [415] 836-1710

Esperanto League for North America, Inc.

P.O. Box 1129
El Cerrito, CA 94530
Usono/USA

Nonprofit Organization
U.S. POSTAGE

PAID

Berkeley, CA
Permit No. 330



NEWS – PLEASE EXPEDITE 

Address Correction Requested
Return Postage Guaranteed

ESPERANTO CALENDAR 1982-1983

| | |
|---------------------|--|
| 1-3 October | NOREK (Northwest Regional Esperanto Conference), Fort Worden State Park, near Port Townsend, WA. |
| 9-10 October | EGI (Intermountain Esperanto Conference), Phoenix-Sun City, AZ. |
| 27-30 December | MLA (Modern Language Association) Conference, Westin Bonaventure, Los Angeles |
| 27 Dec.-2 Jan. | INTERKOMPUTO 82, Budapest - International computer science symposium |
| 4-22 July | 31st ELNA Convention, San Francisco at San Francisco State University |
| 30 Jul.-6 Aug. 1983 | 68th Universal Convention of Esperanto, Budapest |

ELNA DUES FOR 1983

| | |
|---------------------------------|---------|
| Individual Member | \$25.00 |
| Family Membership | 37.50 |
| Youth Member (under 18 years) | 12.50 |
| Student Member (under 25 years) | 12.50 |
| Senior member (65 or over) | 15.00 |
| Supporting member | 50.00 |
| Life Membership | 500.00 |

HEROLDO DE ESPERANTO - Independent newspaper in Esperanto. 17 issues yearly; news, views, reviews, poetry, humor, calendar of events, science.

1982 Subscription Prices:

| | |
|--------------|---------|
| SURFACE MAIL | \$16.00 |
| VIA AIRMAIL | \$19.00 |

FONTO - literary review edited by William Auld, President of the Academy of Esperanto. Monthly offering of translated and original literature by new and established authors. \$15.00 yearly through ELNA Book Service.

ELNA NEWSLETTER

Volume 18, No. 4

ISSN 0030-5065

Bimonthly organ of the

Esperanto League for North America, Inc.

P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530.

Telephone [415] 653-0998.

Editor: Catherine L. Schulze

Production: Wm. R. Harmon

Back issues available for promotional use.

NOTE: As of press time, UEA has still not advised the 1983 dues structure. If you wish to renew your UEA membership early (and the ELNA Central Office urges you to do so - it really helps!), you may send your dues on the 1982 basis and if there is any adjustment, the difference will be refunded or billed.

1982 TARIFF FOR UEA DUES:

| | |
|---------------------------------------|---------|
| Member-Yearbook (MJ) | \$12.00 |
| Member-Subscriber (MA) | 30.00 |
| Societo Zamenhof (additional) | 60.00 |
| Subscription only to <i>Esperanto</i> | 18.00 |
| Subscription only to <i>Kontakto</i> | 9.00 |
| Life Membership in UEA | 750.00 |

Send payments for UEA memberships or subscriptions to UEA, Box 1129, El Cerrito CA 94530. You may include UEA memberships or subscriptions with ELNA membership dues or book orders.

PLEASE IMMEDIATELY NOTIFY ELNA OF ANY CHANGE OF ADDRESS OR TELEPHONE NUMBER

ABONU AŬ REABONU

La Ĉinan Monatan Gazeton en Esperanto **EL POPOLA ĈINIO**

Twelve thick issues a year, each with three large color sections. EPC contains material not only on the People's Republic of China and on the national Esperanto movement, but on the international Esperanto movement as well.

| | |
|-------------|---------|
| por 1 jaro | \$6.00 |
| por 2 jaroj | \$10.00 |
| por 3 jaroj | 15.00 |

El Popola Ĉinio is one of the most outstanding Esperanto publications in the world. Look it over and you'll agree! NEW--beginning November, 1982, U.S. subscribers will receive *El Popola Ĉinio* via AIRMAIL at no extra cost!

Sendu abonpagojn al la loka peranto:

ELNA CENTRA OFICEJO

BOX 1129

EL CERRITO, CA 94530